**EKO**

**Esperiga Komuniko**

**Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado**

## Enhavo

- Landoj, kontinentoj; UEA aktivas
- Nova retejo por prezenti atingojn
- ILEI kuraĝas pri Kanado
- Novaj kursoj en Kroatio
- La sekva kongreso en Israelo

EKO 2019-17 el Budapeŝto la 26an de novembro.

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol mil ricevantoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Landa, loka kaj regiona agado de UEA

Gravas la laboro farata  de sindediĉaj esperantistoj en la, loka, landa kaj regiona nivelo. Valoras la streboj de UEA en la stratosfera nivelo – rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, internaciaj kampanjoj ktp, ĉar nur UEA havas la kapablulojn kaj fortojn entrepreni tiujn laborojn kun UN, Unesko kaj tutmonde agantaj institucioj. Sed la stabila bazo de UEA kaj la komunumo kuŝas en intensa kunlaboro en la diversaj teritorioj de nia terglobo. UEA ne klopodu fari ĉion, sed la komunumo atendas de ĝi efike direktatajn strategiojn kaj projektojn. Tiu kunordigo okazas pere de kontinentaj aŭ regionaj komisionoj,

Iru al <aktivulo.net> kaj klaku 'Landa agado' por legi enkondukon al la prezento; pluiru laŭ la sekva disdivido (en alfabeta ordo):

**Afrika Komisiono** – por la tuta sub-Sahara Afriko.
**Amerika Komisiono** – Nordo, Centro kaj Sudo.
**Azia Komisiono** – momente ĝi ankaŭ prizorgas Oceanion.
**Eŭropa Komisiono** – prizorgas la malfortajn landojn de la kontinento
**MONA** – por la Meza Oriento kaj Norda Afriko.

Por ĉiuj regionoj, ni prezentas datumojn laŭ la sekva sinsekvo.

**Landa Parad':** Laŭlanda detala raporto pri la landoj kun ia movado kun bazaj statistikoj, kontaktinformoj por UEA, TEJO kaj ILEI. (4 el 5 pretaj)
**Komisionoj:** Membroj de la regiona komisiono de UEA kun mandato por 2019-2022. La komisiono formas labor-kolektivon. (4 el 5)
**Asembleoj:** Pli vasta grupiĝo, kiu akceptas membrojn en ĉiuj landoj de la regiono, por garantii informfluon kaj influpovon (kaj kunlaboremon!) en justa maniero. (Konstruataj)
**Laborplanoj:** La laborplanoj por la diversaj regionoj, realigendaj de la komisionoj, kunlabore kun la Landaj Asocioj kaj aliaj aktivuloj. (3 el 5)
**Regionaj Kongresoj:** Okazintaj kaj venontaj kontinentaj aŭ regionaj Kongresoj aŭ Kunvenoj (sekvos)
**Novaĵoj:** Aldonota loko por freŝaj raportoj el la regiono.
Vi ne devas esti membro de komisiono aŭ asembleo por kontribui. Ĉiu forto valoras!

El la ĝisnunaj  komisionoj nur la Azia-Oceania bone funkciis. Gravas analizi la malfortaĵojn de la ceteraj komisionoj. La esenca malfortaĵo estis la klopodo samtempe kontentigi du kontraŭdirajn principojn: unuflanke havi komsionon kiu estas eta, serioze laborkapabla kaj laborpreta. Aliflanke, havi reprezentan grupon, precipe kun membroj el la malfortaj landoj. Do, la nova strukturo estas jena:

- Kerna grupo – serioze laborkapabla kaj laborpreta.
- Asembleo –kun geografia diverseco, kun fortaj kaj nefortaj landoj reprezentataj.

Ekestu konciza, praktika laborplano – kiun la nova komisiono kreu aŭ ricevu proponojn por fine akcepti (tri jam aperas). Ĉiu ero de la plano havu respondeculojn – el la kerna grupo aŭ ekster ĝi. La komisiono havos la taskon regule nutri la asembleojn per novaĵoj kaj invitoj al kunlaboro. Asembleaj membroj venu ankaŭ el pli fortaj landoj, kiuj havas funkciantajn modelojn por agado.





Landa agado okazanta: Supre: Bulgario el 2014; FLAM-analizo; Infonoj kun E-libroj en indonezio en 2016. Sube: MONA aktivas: Sceno el lingva kurso en la 8a Mezorienta Kunveno okazinta en Hammamet, Tunizio en marto 2015; gvidas Özdizdar Murat el Turkio.



# Kursoj de Esperanto en skolta bazo en Koprivnice

La kursoj okazas ekde la 1-a de oktobro 2019 ĝis la 1-a de junio 2020, en la centro Vanaivan, Kroatio. La organizanto mesaĝas: 'Mi petas ĉiujn niajn amikojn kiuj povas helpi kaj varbi novajn esperantistojn (kursanojn) el ĉirkaŭaĵo de Koprivnice (en norda Kroatio, apud la hungara limo). Ĉiuj kontaktoj troviĝas sur ekrano en la fino de la ĉefe kroatlingva vidbendaĵo. Ankoraŭ eblas aliĝi'.



https://www.youtube.com/watch?v=SHYunuc69SU

La foto montras scenon el ĵusa urba festo.

# ILEI preparas sian 53-an Kongreson en Kebekurbo

Tiu evento okazos de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto en Kanado. Eblos veturi per komuna buso al Montrealo por partopreni UK-on (250 km). La Kongreso gastos en Universitato Laval en plej moderna kampuso. Lingvokursoj, prelegoj plej diversaj, lingva festivalo, ludvespero… tiu evento allogas ne nur geinstruistojn. La urbo Kebeko allogas multajn turistojn, ĉar ĝi estas trezoro en amerika tereno, la malnova urbo similas al Parizo kaj plaĉas al multaj homoj. Nur rigardu la foton sekvapaĝe. Vizito al indiĝena vilaĝo okazos kiel komuna ekskurso. Ni gustumu tiun etoson kune uzante nian komunan lingvon.



Foto: Jeff Frenette

# Memore al la 85a UK, denove en Tel Avivo

Komence de septembro la estraro de la Landa Asocio en Israelo (ELI) decidis pri la detaloj de la venonta Israela Kongreso, okazonta en Tel Avivo, 20 jarojn post la 85a UK tie. Ĉiuj informoj troviĝas en la retejo http://esperanto.org.il/ik.html. La kongreso daŭros 4 tagojn (2-5 aprilo 2020) kaj havos riĉan internacian artan programon: Bronŝtejn, Zuzana kaj la Ukraina asembleo A.M.O. Estos tri duontagaj ekskursoj.

Vortoj: 660

===============

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2019/15. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.